| ANNO 94 N.S. 2 | NUMERO 1 | GENNAIO-MARZO 2017 |

L'Esperanto

revuo de IEF

ISSN 1974-9147 – rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p. 2) – Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero.

IN QUESTO NUMERO

Saluto (D. Astori), 2
El la mondo – "Andrej Korobeinikov, ido de Orfeo kaj nepo de Zamenhof" (A. Grassini), 3
Celebrazioni – La settima edizione del Premio 'G. Canuto' (G. Zanoli), 6
Grupo prezentas sin – "La vocazione esperantista bolognese fra *locale* e *internazionale*", 7
Niaj eminentuloj – "Achille Tellini: kiu estis tiu?" (L. Testoni), 11
Memoraĵo – "Pierluigi Marelli kaj lia Premio" (E. Rodari), 13
Junulare – IJF 2017: aprile 12-a-18-a, Castione della Presolana - BG (A. Vitale), 14
Kulture kaj lingve – Literatura tradukkonkurso, 15
Junulare – Concorso 'Marelli' 2017, 15
Niaj perloj (Premio 'Trombetta' 2016) – Luisa Madella Oberrauch (D. Astori), 16
Niaj perloj (Premio 'Trombetta' 2016) – Pedro Aguilar Solà (C. Pavese), 17
Junulare – Premio 'Canuto' 2017, 18
Niaj najbaroj – "Espéranto-France – intervjuo kun A. Kadar" (R. Corsetti), 19
Ricordo – Reinhard Selten (D. Astori), 21
Approfondimento – V. Andriukaitis, "Europa e Multilinguismo" (trad. N. Minnaja), 23
Interlinguistica V – "Alle origini dell'interlinguistica: Cartesio e Leibniz" (F. Gobbo), 25
Recenzoj – F. Gobbo, *Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti* (N. Minnaja), 29
Okazis antaŭ cent jaroj, 31

Saluto

Il 2017 saranno cento anni dalla scomparsa di Zamenhof. Molte celebrazioni si susseguiranno nel mondo, e anche la FEI sta progettando degli eventi; quanto alla rivista, al *Majstro* sarà dedicato il prossimo numero. In questo trovate le ormai abituali rubriche e qualche (confidiamo) interessante occasione di approfondimento; la pagina centrale è poi dedicata, come promesso nel numero scorso, ai due insegnanti dell'anno, vincitori del Premio 'Trombetta' 2016. Nella sezione 'Okazis antaŭ cent jaroj', poi, constatiamo quanto sia vero il detto *nihil sub sole novi*: dal rinnovo delle tessere, ai costi di spedizione, alla vita di segreteria. L'esperanto è, per riprendere le parole di Franco Fortini a Vittorio Sereni, 'un destino' …

Se siete poi ansiosi di ricevere la rivista, se volete salvare la vita degli alberi, se volete far risparmiare la nostra FEI, potete richiederne l'invio per posta elettronica in pdf; la riceverete molto prima e potrete leggerla comodamente al computer, od altro.

Buon 2017, allora, e buona lettura. (d.a.)

La jaro 2017 estos la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof. Pluraj eventoj okazos tutmonde, kaj ankaŭ IEF estas organizanta kelkajn; koncerne la revuon, al la Majstro estos dediĉita la ontan numeron. En chi tiu vi trovos la jam kutimajn rubrikojn kaj iujn (ni esperas) interesajn pliprofundigajn temojn; la centra paĝo estas dediĉita, kiel promesite pasintnumere, al la du instruistoj de la jaro, gajnintoj de Premio Trombetta 2016. En la sekcio "Okazis antau cent jaroj", krome, ni konstatas kiom vera la eldiro *nihil sub sole novi* [nenio nova sub la suno]: de la realiĝo, al la sendokostoj, al la segreteria laboro. Esperanto estas, por citi la vortojn de Franco Fortini al Vittorio Sereni, "sorto" ...

Se vi sopiras ricevi la revuon, se vi emus savi la vivon de la arboj, se vi volus ŝparigi nian IEF-on, vi povus peti ĝian sendon per retpoŝto en pdf-formato; vi ĝin ricevos multe pli frue, kaj povos ĝin legi komforte per komputilo, aŭ per alia aparato.

Serenan 2017, do, kaj agrablan legadon. (d.a.)

In copertina, Andrej Korobeinikov (al centro) con Aldo e Daniela Grassini.
Surkovrile, Andrej Korobeinikov (meze) kun Aldo kaj Daniela Grassini.

L'Esperanto
revuo de IEF

Direttore Responsabile – Leĝe Respondeca
Direktoro: Davide ASTORI
tel. 320 2914608 – davide.astori.2@gmail.com
Redattori – Redaktoroj:
Renato CORSETTI, Pier Luigi CINQUANTINI
Revisori – Korektantoj: Cristina DE' GIORGI, Michela LIPARI, Antonio DE SALVO
Progetto grafico e impaginazione – Grafika ideo kaj enpaĝigo: Nicola REGGIANI
***
Amministrazione – Administrejo:
FEI – Federazione Esperantista Italiana
Via Villoresi, 38 – I 20143 Milano
tel.02 5810 0857 – fax 02 3674 0711
mail: feisegreteria@esperanto.it
http://www.esperanto.it - C.F.80095770014
***
C.C. Bancario – Bankkonto:
Banca Prossima - Milano
IBAN: IT21M0335901600000119380
BIC/SWIFT: BCITITMX
***
C.C. Postale – PoŝtKonto:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT94O0760101600000037312204
BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX
***
Consiglio Direttivo FEI – IEF-Estraro:
Michela LIPARI, presidente
vacat, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario
Renato CORSETTI, attività informativa
Riccardo PINORI, segretario-tesoriere
Ivan ORSINI, attività editoriale, IEJ
Paolo SCOTTI, attività informatica
***
Pubblicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2016 (comprensive di € 10 dell'abbonamento alla rivista, per tutti gli associati tranne gli Associati Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione FEI.
***
Registrazione al Tribunale di Milano n. 85 del 27 febbraio 1970.
Stampata presso www.atena.net
***
ISSN 1974-9147

Andrej Korobeinikov, ido de Orfeo kaj nepo de Zamenhof

Aldo Grassini

Gotenburgo. 2003. En la U.K. oni proponis piankoncerton, kaj mi iris scivoleme. Oni prezentis aron da pecoj de Aleksandr Skrjabin. Mi estis fulmtrafita: "Kiu estas tiu eksterordinara pianisto?". "Ho, deksepjara knabo". "Ĉu deksepjara?... Neeble! Li estas geniulo!". Kaj mi kuris al tia mirindulo! Fakte mi troviĝis antaŭ svelta kaj iom timida adoleskulo, kaj tiu estis mia unua kontakto kun Andrej Korobeinikov. Mi estis certa, ke lia nomo iam fariĝos fama. Kaj mia prognozo rapide veriĝis. Tro facile! Lia talento senpere brilas. Ĉiufoje kiam li povas ĝin proponi. Kiel "mirakla infano" li kolektis multajn premiojn en gravaj naciaj kaj internaciaj piankonkursoj. Kaj nun tridekjara, li estas artisto konata kaj aprezata tra la mondo. Li koncertas en la plej prestiĝaj koncerthaloj, kaj li kunlaboras kun kelkaj elstaraj orkestroj kaj mondfamaj direktoroj.

La unuan de oktobro 2016 ni aŭskultis lin denove, en Cremona. Ĉifoje li ludis duope kun Vadim Repin, mondfama violonisto. La sukceso de la duopo estis furora. Poste ni salutis lin, kaj li respondis per sia kutima afableco, kaj li aldonis eblan Bolonjan rendevuon en februaro por koncerto ĵus anoncita kaj konfirmenda. Nun mi volas intervjui Andrejon, iom fiera troviĝi antaŭ grava koncertisto, tiu sama deksepjara knabo, kiu antaŭ dektri jaroj jam mirigis min!

Andrej, kiam kaj kiel naskiĝis via granda amo al Muziko? *Mi estis eta infano, kaj mi kun mia patrino, dum tre malriĉa vivperiodo, duonkaŝe loĝadis en subtegmentejo de muzika lernejo. Dumnokte mi ofte vagadis tra la klasĉambroj de la lernejo, kaj mi provludis plurajn muzikinstrumentojn. Tial naskiĝis mia amego al fortepiano. Kvinjara mi komencis serioze studi ĝin, kaj de tiam mi partoprenis en multaj konkursoj rusaj kaj internaciaj, kaj dudekon da ili mi gajnis*.

Iam vi rakontis al mi, ke gajninte konkurson, televida raportisto demandis al tiu "mirakla infano", kion li pleje deziras. Kaj vi respondis naive: "Mi ege deziras loĝejon, ĉar mi ne havas!", kaj post iom da tempo vi fakte ricevis loĝejon! *Jes,vere! Tio estis miraklo! Dankegon al Irena Nesnevskaja, direktorino de televidkompanio. Ŝi aĉetis por mi kaj mia patrino loĝejon per sia mono!... Iom da mirakloj okazis ankaŭ en la studado. Mi pretersaltis kelkajn klasojn dum lerneja tempo, kaj dekdujara mi jam rajtis eniri universitaton. Por eniri Eŭropan Juran Universitaton en Moskvo mi havis kunsidon kun la rektoro - tie mi hazarde ludis pianon kaj li proponis stipendion eĉ por jura studado. Dekkvinjara mi estis akceptita en Konservatorion 'Ĉajkovskij' en Moskvo, kies enirkonkurso estas ege malfacila, kaj mi diplomiĝis kiel unu el la plej meritaj. Poste la samo okazis en la postdiploma kurso en Londona Reĝa Kolegio de Muziko, kie oni donis al mi 'Rozan Ujon de Reĝino Elizabeto'(Queen Elisabeth Rosebowl).*

Kaj do eĉ tie vi estis premiita kiel la plej valora studento! *Sed mia koncertado komenciĝis pli frue tra Rusio kaj multaj aliaj landoj.*

Apenaŭ tridekjara vi jam koncertas en multaj prestiĝaj koncerthaloj tra la mondo, kiel solisto kaj kun elstaraj orkestroj. Vi do jam apartenas al la ne vasta mondo de la elstaruloj! *Mi ludis en pli ol kvardek landoj el kvar kontinentoj. Tion mi atingis per senlaca ekzercado multhora ĉiutage. Sed la vojo estos ankoraŭ tre longa*.

Jen via ĝisfunda modesteco kaj via senfina perfektiĝemo! Sed la publiko adoras vin pro via mirakla virtuozeco, pro via esprimforta temperamento kaj samtempa kapablo vibrigi la plej delikatajn kordojn de la homa animo. La publiko vin aŭskultas per la oreloj kaj per la okuloj: la videbla enpenetriĝo de via figuro en la pianon ravas la geaŭskultantojn, kaj via mieno de bona knabo akiras al vi ĉies simpation! Sed el via vastega repertuaro kiun aŭtoron vi plej ŝatas? *Mi vivas de muziko kaj ĉiam muzikon mi amegas eĉ modernan kaj ne nur klasikan. La aŭtoro, al kiu mi estas plej ligita eble estas Aleksandr Skrjabin, ampleksa kaj malfacile plenumebla, sed senkompare riĉa je rektaj kaj elfosendaj esprimaĵoj. Cetere, je la nomo de tiu rusa komponisto mi ricevis unu el la plej prestiĝaj agnoskoj, kiam mi dekokjara gajnis la unuan premion en grava konkurso, kiu estis al li dediĉita*.

Sed vi atingas samnivelajn pintojn en via interpretado ĉu ĉe intimecaj komponistoj kiaj Skrjabin aŭ Chopin, ĉu ĉe eksplodaj pecoj de Ŝostakoviĉ aŭ Prokofiev. Cetere, estis brilegaj viaj plenumadoj de koncertoj de Ĉajkovskij kaj de Rachmaninov, kiujn mi bonŝance aŭskutis perdiske! *Vidu: se vi amas muzikon, vi nepre devas kunfandi vian animon kun tiu de la interpretata muzikisto. Vi devas plenumi la jenan miraklon: gardi vian memon kaj samtempe transmigri en la koron de via aŭtoro*.

Sed vi, Andrej, ankaŭ estas esperantisto. Kiam vi alproksimiĝis al la Internacia Lingvo? Ĉu ekzistas ia rilato inter esperanto kaj via profesio? *Pro mia profesio mi lernis kelkajn lingvojn: krom la rusa, mi parolas la anglan, la francan kaj la italan. Pri la itala eble estas por vi interese, ke en Konservatorio Ĉajkovskij mi lernis ĝin de Giuliano Gramsci, la filo de Antonio Gramsci, ĝuste tiu, al kiu la patro dediĉis* Lettere dal carcere. *Esperanton mi eklernis en Eŭropa Jura Universitato, kie mi studis juron. Tie esperanto estis deviga, ĉar iam tie prelegis kelkaj profesoroj de Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, kies membro tiu universitato estis. Mi partoprenis en efektive dektaga esperantokurso gvidata de elstara rusa advokato, prof. Genadij Ŝilo. Li estis la rektoro, kiu donis al mi stipendion akceptinte min en la universitaton tiel fruaĝe. Mi tuj ekamis nian mirindan lingvon, sed vere mi komencis uzi ĝin post mia partopreno en la Zagreba U.K., mia unua internacia esperanta kongreso. Tie mi ankaŭ ludis koncerton, kaj mi sentis specialan emocion muziki samtempe por homoj de multegaj landoj. Mi ekkonsciis posedi samtempe du bonegajn internaciajn lingvojn: esperanto kaj muziko! Post tiam mi feliĉis koncerti kaj amike babiladi en Gotenburgo, Pekino, Florenco kaj Lillo. Mi amikiĝis kun kelkaj elstaraj esperantistoj: Kazuko Kikushima (Krizantemo) kaj familio Grassini (vi, Aldo, kaj Daniela). Tiuj-ĉi lertaj kaj helpemaj homoj eĉ organizis por mi koncertojn kaj muzikvojaĝojn tra siaj landoj. Nekredeble! Do esperanto en mia vivo ĉiam iras kun muziko, kaj kiel muziko ĝi donas nur ĝojon!*

En via vivo, Andrej, okazis kelkaj mirakloj, sed ripetiĝanta miraklo estas via kapablo ensorĉi la homojn per la sonoj de via fortepiano! Ankoraŭfoje dankon por la intervjuo.

Roma, 13 ottobre 2016. Ci lascia Dario Fo. Era vicino all'ideale esperantista: l'8 febbraio 2013 aveva partecipato, presso la Camera dei Deputati di Roma, in collaborazione con il deputato radicale Marco Beltrandi, alla Conferenza su "L'internazionalizzazione della e nella lingua italiana" (vi intervennero, fra gli altri, nomi del calibro di Robert Philipson, Giovanni Fasanella, Paolo Grossi, Aron Luckacs, Umberto Croppi, Pino Caruso, Luciano De Crescenzo, e concluse la giornata Marco Pannella), e nel 2006 accettò di fare parte del Comitato d'Onore del Congresso Universale di Esperanto di Firenze. Segnaliamo almeno l'intervista, sul tema: "Ci rubano la lingua?", rilasciata a Giorgio Pagano nel 2014, on line all'indirizzo: https://www.youtube.com/watch?v=XNFvXUdavC0.

* * *

Premio Pulĉinelo 2016

Nicolino Rossi

Merkredon la 12an de Oktobro 2016, en la klubejo de la Napola Esperanto-Grupo "Harmonio kaj Progreso – E. Mingo", Via S. Brigida 64 en Napolo, okazis la solena manifestacio de la Prezentado kaj Premiado de la konkursaĵoj partoprenintaj en la VI-a Konkurso de Pluraj Artoj Pulĉinelo 2016, tradicie organizita, kiel dum la pasintaj jaroj, fare de la napola esperantistaro. En la foto la Prezidantino de la Napola Esperanto-Grupo, Dr-ino Maria Rosaria Esposito, kun Alessandro Ceraso, kiu gajnis la unuan Premion por la Sekcio Pluraj Artoj pro lia '*Arta Retpaĝo - Blogo Palepolis*', kiu utiligas ankaŭ la lingvon Esperanto en siaj tekstoj, kun jena motivigo: "La Ĵurio, post detala debato, decidas atribui la Unuan Premion Pulĉinelo 2016 al la 'Blogo Palepolis/Arta Retpaĝo' de Alessandro Ceraso, ĉar ĝi reprezentas intuician novaĵon, kiu utiligas kaj proponas la modernajn, virtualajn esprimoteknologiojn". Unua Premio Pulĉinelo 2016, por la Sekcio Literaturo al Inĝ. Nunzio Industria, pro lia poeziaĵo *Nascere altrove* [*Naskiĝi aliloke*] kun jena motivigo: "Ni atribuas la Premion Pulĉinelo 2016 al *Naskigi aliloke* pro la drama aktualeco de la enhavo kaj pro la vibra esprimivo de la versoj". La Juĝkomisiono estis formita de: Prof-ro Giulio Tarro, eminenta napola sciencisto kaj virusologo internacie famekonata; S-ino Anna Staiano, fakulino pri grafikaj artoj; S-ro Giacomo Della Guardia, esperantisto, kanzon-aŭtoro, eks-prezidanto de nia Grupo; S-ro Nicolino Rossi, esperanto-poeto.

Il 'Canuto' alla sua settima edizione

Gustavo Zanoli

Il premio 'G. Canuto' 2016 è stato assegnato, mercoledì 19 ottobre 2016, a Cesare Novara, studente dell'Università di Parma, per la tesi dal titolo "Proposte di riconoscimento legale dell'esperanto in Italia". Dopo il saluto della nostro presidente Michela Lipari, e il conferimento del premio da parte di padre Gustavo Zanoli, Presidente dell'Associazione Esperanto 'G. Canuto' di Parma (nella foto a fianco, insieme al premiato), è stata letta una coinvolgente prolusione, sul tema: "La ricerca della lingua universale da Comenio a Zamenhof", redatta da Giordano Formizzi, già pedagogista dell'Università di Verona e per 12 anni presi-dente della FEI, che all'ultimo non ha potuto presenziare di persona per problemi non dipendenti dalla sua volontà.

Nel pomeriggio (nella foto – di Eddy Vallara – il pubblico) ha completato la giornata una Tavola rotonda sul tema: "Esperanto e spiritualità", che confluirà nel numero speciale del prossimo anno. Questi gli interventi, magistralmente introdotti e moderati da Luciano Mazzoni Benoni, direttore di *Uni-versum*: "Zamenhof e l'Ebraismo" (Michela Lipari), "L'Esperanto nel mondo arabo" (Renato Corsetti, già Università di Roma "La Sapienza"), "Esperanto e Chiesa cattolica" (lo storico antichista Nicola Reggiani, Università di Trier), "Esperanto e Fede Baha'i" (Maria Augusta Favali, rappresentante della Fede Baha'i in "Religions for Peace"/Italia), "La proposta homaranista" (Davide Astori).

La vocazione esperantista bolognese fra 'locale' e 'internazionale'.

a cura del gruppo esperantista bolognese 'A. Tellini 1912'

A inizio Novecento, a Bologna, diversi erano i cultori della *lingvo internacia*, ma furono coordinati in un'associazione solo nel 1912, ad opera di Achille Tellini (di cui più dettagliatamente si racconterà nel successivo contributo di Lidia Testoni), che nel 1912 fondò la "Società Esperantista Emiliana", successivamente "Gruppo Esperantista Bolognese" (a lui intitolato dal 1949), e la "Cattedra Italiana di esperanto", oggi l'"Istituto Italiano di Esperanto" che coordina le numerose Cattedre locali presenti in Italia.

La 'Società Esperantista Emiliana'

Il congresso italiano del 1920. Nel vivace dinamismo culturale dell'Emilia del primo decennio del Novecento non meraviglierà la presenza, nel 1902, a Riolunato, di un gruppo esperantista, dovuto all'entusiasmo del conte Albert Gallois, che, giunto nell'Appennino modenese per amore, vi organizzò quello che può essere considerato il primo raduno internazionale di esperantisti. Nel 1905, tre anni prima dell'arrivo di Tellini a Bologna, si era tenuto il primo Congresso internazionale di Esperanto a Boulogne-sur-Mer in Francia, e nel 1910 nasceva la FEI. In questo contesto la vitalità bolognese si presenta da subito esemplare, con la volontà di organizzare un Congresso nazionale su suolo felsineo nel 1914, rinviato a tempi migliori per ragioni di guerra. Così organizzò il quinto Congresso nazionale, quello del 1920 (3, 4 e 5 ottobre). La sede del comitato organizzatore del Congresso era in via Manzoni 1, lo studio dell'avvocato, e vicesindaco di Bologna, Filippo Palmeggiani, che tra l'altro ricopriva

anche il ruolo di presidente del Comitato, coadiuvato da Ubaldo Masi, Otello Nanni e Umberto Toschi, che sarebbe divenuto professore di geografia economica all'Università di Bologna. La manifestazione inaugurale avvenne nella Sala della fratellanza militare. Il *Resto del Carlino* dedicò molti articoli all'evento, raccontando dell'inaugurazione con le seguenti parole (articolo del 4 ottobre 1920):

> Vi è stato un notevolissimo intervento di rappresentanze di associazioni italiane ed estere, di quasi tutti i ministeri, di camere di commercio. Il presidente onorario, senatore Pini, ha pronunciato il discorso inaugurale, profondo e smagliante. Ha professato da prima la sua fede nell'esperanto. Finiti gli applausi insistenti rivolti al senatore Pini prende la parola il comandante Prof. Alessio, rappresentante del Ministero della Marina.

Personaggio centrale del Congresso fu Alberto Alessio, personalità importante negli ambienti della Marina militare, che aveva abbracciato la causa esperantista e aveva conosciuto Achille Tellini.

Il congresso italiano del 1952. Dopo gli orrori e la forzata inattività degli Anni Quaranta, Bologna si ripropone come ospite del Congresso nazionale del 1952, che rappresentò il culmine di un processo di vera e propria rinascita del movimento esperantista, cittadino e non solo. L'Associazione Esperantista Emiliana, come l'araba fenice, di fatto era risorta dalle sue ceneri nel 1949, ribattezzandosi a nuova vita anche con la simbolica ridenominazione in "Gruppo Esperantista Bolognese 'Achille Tellini'" (d'ora in poi, GEB), intitolato al nome del fondatore. Parteciparono fattivamente alla vita del Gruppo i funzionari delle Ferrovie dello Stato Otello Nanni, Ottavio La Mura e Giuseppe Zacconi (che ricevette, forse per primo in Italia, la Croce di Cavaliere della Repubblica Italiana *per meriti esperantisti*); e, ancora, Umberto Toschi e l'avvocato Raffaele Bagnulo. Il 7 settembre 1952 si aprirono nell'Aula Magna dell'Università di Bologna i lavori del XXIV Congresso italiano di Esperanto, che durarono sino al 10 settembre. L'Avv. Bagnulo presiedeva il Comitato organizzatore, mentre la carica di presidente del Congresso era in capo a Giorgio Canuto, rettore dell'Università di Parma. Il Comitato d'onore del Congresso si fregiava di nomi illustri: da Luigi Einaudi, allora presidente del Consiglio, ai Presidenti emeriti Giovanni Gronchi e Alcide De Gasperi, al successivo Antonio Segni; e ancora Bruno Migliorini (celebre storico della lingua italiana), e, di Bologna, l'arcivescovo Giacomo Lercaro, il prefetto, il direttore dell'Archiginnasio e il sindaco Dozza. Di Einaudi fu letto il messaggio di saluto, al momento dell'apertura dell'evento:

> Mentre i fedeli dell'Esperanto convengono in Bologna in un comune anelito di ognor più concrete affermazioni del loro movimento, tendo a far giungere ai Congressisti tutti, insieme con il mio augurale saluto, quel tributo di schietta simpatia che va reso a quanti danno generosa opera per l'avvicinamento dei popoli.

Al Congresso diede un contributo importantissimo, non ultimo con i suoi ricchi e profondi interventi, il Prof. Gino Bottiglioni, dell'Istituto di Glottologia dell'Università cittadina.

Il Congresso universale del 1955. Il Congresso del 1955 (31 luglio – 8 agosto) rappresenta una pagina fondamentale nella storia del GEB: forse fu in quell'occasione che le istituzioni locali e nazionali si dimostrarono più vicine all'universo esperantista italiano. Gli iscritti, provenienti da 36 paesi (non pochi se teniamo conto che in quel momento l'Europa era divisa dalla cortina di ferro, e che i viaggi erano meno facili e molto più costosi di quanto siano oggi) furono 1.687: 336 italiani, 1288 da paesi europei, 63 da altri continenti. Il Comitato d'onore annoverava, fra gli altri, i primi tre Presidenti della Repubblica, e il Comune di Bologna sostenne concretamente ed in vari modi l'organizzazione del Congresso, in particolare concedendo il Teatro comunale, sia per l'inaugurazione sia per la serata teatrale. Sede prestigiosa del Congresso fu l'Università, mentre il ballo ufficiale si tenne nello splendido salone di Palazzo Re Enzo. Venne persino offerta dall'Ente Provinciale del Turismo una gita a Rimini in treno per 100 Congressisti. La stampa cittadina diede ampio risalto alle giornate; seguì i lavori, con un reportage giorno per giorno, uno spiritoso cronista del *Resto del Carlino*, un Luca Goldoni allora 27enne. Nel corso del Congresso venne intitolata a Zamenhof una strada situata nei pressi di via Murri e via Dagnini. Molti Vigili Urbani durante il Congresso portavano un bracciale con una stella verde: erano quelli che avevano partecipato al corso di Esperanto organizzato dal Comune, ed erano quindi interpreti ufficiali per gli esperantisti convenuti. E sugli autobus erano esposte due bandiere, quella italiana e quella esperantista con la stella verde. Era in funzione anche il campeggio *Rivera Stelo*, Stella del fiume, inaugurato poco più di un anno prima a Casteldebole, tenuto da esperantisti.
Fra i momenti più significativi fu il discorso, tenuto in perfetto Esperanto, dall'allora sindaco di Bologna Giuseppe Dozza all'inaugurazione, che ebbe ad affermare:

Bologna… estas fiera akcepti la tutmondajn batalantojn por la paco.

Il tavolo delle autorità al Congresso Universale del 1955. Da sinistra: al microfono, il sindaco di Boulogne-sur-Mer, M. Héguenette, accanto (seduti) il sindaco di Bologna, Giuseppe Dozza, il presidente dell'UEA, Ernfrid Malmgreen, il presidente della FEI, Giorgio Canuto.

Dagli anni Sessanta a oggi. Dopo il Congresso Universale la città conosceva l'Esperanto e i suoi cultori; fra questi c'erano diversi insegnanti, e ciò permise di avvicinare il mondo della scuola con un certo successo. Nel 1959 in tutto il mondo, e anche a Bologna, si tennero i festeggiamenti per il centenario della nascita di Zamenhof. Nel 1965 gli esperantisti accompagnarono il gemellaggio che era stato organizzato fra le città di Bologna e di Zagabria. Nel 1972 e nel 1982 si celebrarono il il 60° e il 70° anniversario dalla nascita del GEB. La crescita dell'esperantismo bolognese non avrebbe potuto raggiungere i risultati che ottenne se non ci fosse stato l'apporto fondamentale dei Ferrovieri Esperantisti, associazione nata proprio a Bologna nel 1909. Negli anni 1985 e 1986 gli esperantisti di Bologna dedicarono manifestazioni pubbliche al tema della Pace, in collaborazione con le associazioni pacifiste della città. In particolare, un nuovo Congresso italiano di Esperanto, il cinquantasettesimo, fu organizzato nel 1986 (dal 29 agosto al 5 settembre), ed ebbe come tema: *Esperanto: una via alla Pace*. Negli anni Ottanta fu costituito il fondo librario esperantista della Biblioteca dell'Archiginnasio, la più importante della nostra città. Nel 2000 il Congresso italiano di Esperanto si è svolto a Casalecchio di Reno nell'ambito delle manifestazioni di *Bologna capitale europea della cultura*.

Fra le tante attività legate al territorio, ogni anno, nella seconda metà di febbraio, il GEB organizza la *Festa del Mondo*, in cui si incontrano persone di lingue diverse, per uno scambio di "briciole" di cultura, anche gastronomica. Il Gruppo Tellini 1912 (che si riunisce il mercoledì e il sabato pomeriggio in via Avesella 16, nella sede di cui è proprietario in seguito a un lascito di Gustavo Voltolini, nipote del fondatore) celebra quest'anno il centocinquantenario dalla nascita di Achille Tellini, fra l'altro con l'organizzazione, sabato 26 novembre, di convegno mattutino presso la sala multimediale della biblioteca comunale 'Ruffilli' di vicolo Bolognetti 2 (nella foto a fianco, i relatori, da sinistra: Claudia Malpeli, Istituti Culturali e Biblioteca della Repubblica di San Marino; Davide Astori, linguista, Università di Parma; Michele Moramarco, saggista; Ivan Orsini, Presidente del gruppo locale; Laura Rossi, ex Direttrice della Biblioteca della Repubblica di San Marino, studiosa di storia sammarinese).

Per approfondimenti, si rimanda a: L. Tadolini, *L'Esperanto in Emilia-Romagna*, CERER, Bologna 1989; Gruppo Esperantista Bolognese 'Achille Tellini 1912', *Centenario della fondazione della Società Esperantista Emiliana e della Cattedra Italiana di Esperanto*, Memeldono, Bologna 2012.

Achille Tellini, kiu estis tiu?

Lidia Testoni

Achille Tellini estis friulano, el nord-itala regiono Friuli; li naskiĝis la 25an de februaro 1866. Li estis filo de Giambattista, komercisto de altkvalitaj tolaĵoj, patrioto de Venecia Respubliko, spertulo pri Dante kaj fondinto de la unua gimnastika kaj skerma sportejo en regiono Friuli.

Achille doktoriĝis en Torino, tuj poste li komencis sian universitatan karieron ĉe "La Sapienza" en Roma, kiel asistanto de la fama paleontologo Alessandro Portis. En Roma li komencis sian senlacan agadon kiel publicisto kaj eseisto. Tiu ĉi vojo estis indikita al li de la patro, kiu, laŭ malnova pludaŭrigita tradicio, destinis al ĉiu el la tri filoj la daŭrigon de la interesoj kaj de la familiaj aferoj: al Edoardo li konfidis la komercojn, al Emilio la bienojn kaj al Achille la pasion por la studoj, al la esploradoj, krome al la politika kaj socia sindevigoj. El Roma Achille revenis al Friuli ĝuste por sin dediĉi al la scienca instruado en unu el la plej prestiĝaj institutoj en Udine, sed la travivaĵoj kondukis lin loĝi dum multaj jaroj en Bologna, urbo por li fundamenta kruc-vojo de novaj iniciatoj: unue tiuj kunligitaj kun la interkonatiĝo kaj pliprofundigo de Esperanto, krome de la celoj kaj de la esperantistaj idealoj; en la jaro 1912 li fondis la Emiljan Esperantistan Societon. Lia hejmo en strato De' Gombruti fariĝis malferma esperanto-centro por tiuj kiuj kun li strebis al la ideo kaj al la studo de universala lingvo kunligonta la popolojn kaj transpasonta la barojn de la nekomprenado.

Achille Tellini (kunĉapele) en Berno (UK 1913)

Dum la unua modmilito, pere de Esperanto kaj danke al ĝi, li donis subtenon al la asistado de la rifuĝintoj, al la serĉado de kaptitoj kaj de disperdiĝintoj enteksante, per densa reto de esperantista korespondado, solidarecan ĉenon kiu kuntrenis ĉiujn naciojn batalantajn. Dum la paca tempo li provis komercajn eksperimentojn, por pruvi la taŭgecon de la internacia lingvo kaj produktis interalie reklamajn afiŝojn en esperanto rilate al la unuaj mastrumaj aparatoj, kaj al la unuaj iloj por plibonigi la staton kaj vivmanieron de la homoj (hararsekigilo, gimnastika biciklo, remaparato, masaĝaparato).



El Bologna Achille de tempo al tempo forvojaĝis, ekipita kiel sperta esploristo kaj marŝamanto, por gvidi esperanto-kursojn kaj enkonduki prelegojn pri la internacia lingvo en pluraj provincaj urboj. Li timis nek senĉesajn kontrolojn nek daŭrajn policajn atentigojn. Ida, lia edzino, kaj la sep gefiloj konsciis ke, kiel la pordo estas malfermenda por la amikoj esperantistoj, tiel estas timendaj nek vizitoj nek policaj lokinspektadoj. Ĉiu familiano havis sian propran rolon helpante la patron en la studoj kaj en la redaktado de liaj skribaĵoj, kaj traktante kune la oftajn korespondaĵojn; ĉar ĉiuj certis ke nenial Achille rezignos pri siaj propraj idealoj kaj konvinkoj, kiujn li volis efektivigi per iniciatoj kaj agadoj al kiuj li sin dediĉis kun granda entuziasmo kaj senfinaj energioj. Inter pluraj rakontoj kaj anekdotoj transiĝintaj de unu generacio al la alia de familio Tellini, restas konata tiu pri la junaj filinoj ”persvaditaj” de la patro, ke ili partoprenu en karnavala marŝparado tra la stratoj de Bologna surmetinte verdajn grandajn surtutojn kaj levante la esperantistajn flagojn.

Achille obstine sin ĵetis en la estonton; fakte li ege esperis pri socio riĉa je moralaj valoroj kaj viglaj interesoj kaj antaŭvidis ĝin, ĉar – li skribis – «ne progresi estas malprogresi». Dum multaj jaroj li prizorgis kaj verkis, esperante kaj itale, librojn, gramatikojn, vortarojn, propagandilojn, turismajn gvidlibrojn, gazet-artikolojn. La 10-an de oktobro 1938 li forpasis en Udine en la 72-a jaraĝo.

Unu el pluraj glumarkoj de Achille Tellini:
“En neniu lando la esperantisto estas eksterlandano / PACO”

Pierluigi Marelli kaj lia Premio

Ermigi Rodari

Pierluigi Marelli naskiĝis la 12an de aprilo 1929 kaj vizitadis superan teknikan lernejon atingante la diplomon de industria diplomito. Dum sia labora vivo li havis diversajn interesojn: en la lastaj jaroj li sin dediĉis al komerco de industriaj diamantoj. Li estis sufiĉe timida persono, iom introvertita, sed obstina pri siaj celoj kaj agoj kaj por ilin defendi aŭ atingi ne ĉiam estis diplomatia, kun kelkfoje koncernaj sekvoj. Lia esperantiĝo okazis tuj post la mondmilito kaj li fariĝis agema membro kaj estrarano de la milana klubo. En 1963 li kunlaboris kun la ge-anoj Conterno, Dall'Acqua kaj Turone pri la eldonado de tre altnivela revuo, *Rivista Italiana di Esperanto*, pritraktante science kaj lingvistike la lingvon, sed ĝi havis efemeran vivon ĉar ĝi ne sukcesis atingi la celitan ne-esperantistan legantaron. Poste dum pluraj jaroj li malaperis precipe pro familiaj kialoj sed kiam li revenis li fariĝis pli vigla ol antaŭe kaj dediĉis multe da tempo kaj rimedoj al Esperanto. Oni ŝuldas al liaj kapabloj, kun la grava helpo de s-anoj Bertoletti, Foà kaj Corrado, la sukceson de la 55a itala kongreso kiun la milananoj organizis en S. Pellegrino en 1984.

Tiu ĉi sperto puŝis lin verki la tre taŭgan manlibron pri la organizo de la kongresoj, kiu dum pluraj sekvaj jaroj helpis la organizajn komitatojn, kutime ĉiujare kon-sistantaj el novaj komisiitoj de iu loka grupo. Post lia reveno, kulpigante la nacian movadon pri mallaboremo en stagna situacio, entuziasme li aliĝis al la pli agema kaj promesplena ERA, sed ankaŭ tiu ĉi ne estis por li sufiĉa. Kelkaj ankoraŭ memoras lian seniluziiĝan kolorplenan aserton: "mi estis konvinkita iri kun Garibaldi sed mi konstatis esti kun Masaniello". Oni devas ankaŭ aldoni ke la pensoj de Marelli estis modere dekstremaj. Denove li fariĝis agema ano de FEI, klopodante ĝin veki kaj stimuli, iom post iom ricevante ĉiam pli gravajn taskojn ĝis esti nomumita organiza sekretario. Krom la daŭra kunlaborado kun la itala revuo, krom la loka bulteno, li persone prizorgis eĉ la sendadon de miloj da leteroj al aŭtoritatoj kaj gravuloj klopodante interesigi ilin pri lingvaj problemoj kaj Esperanto.

Du estis liaj konvinkoj. La unua, dum la junaĝo, estis ke aŭ Esperanto venku dum tiamaj jaroj kiam okazis internacia konflikto inter la kreskanta angla kaj la mal-kreskanta franca lingvoj, aŭ ni devos porti la torĉon atendante novan ŝanĝiĝantan situacion kiam Usono, kun sia lingvo, eksubiros. Nuntempo eble pravigas lin. La dua estis ke ofte la esperantistoj mem damaĝas Esperanton ĉar maltaŭgas propagandi lingvon fare de personoj kiuj ĝin ne regas aŭ, pro entuziasmo kaj nescio, doni erarajn aŭ mensogajn informojn pri ĝi aŭ ĝiaj historio kaj konsisto. Oni riskas nekredeblecon kaj mokojn. Kiel eviti tion? Kio povas garantii nian kompetentecon? Certe tiuj kiuj superis la triagradan ekzamenon taŭgas!

Do, oni devas multobligi kaj premii ilin. Pro tio li testamentis ke post la morto ĉiuj havaĵoj estu utiligataj por starigi apartan fonduson (verdire li pripensis ian fondaĵon sed la Itala Ministerio malaprobis ĝin) kiu donu la eblecon premii la plej lertajn junajn triagradanojn. Jen Premio Marelli kiu praktike nur parte trafas la celon. Bedaŭrinde.

Por nekrologo en la itala Esperantujo v. *L'esperanto*, 1987/1 (januare), paĝ. 3 (el kiu estas reprenita la foto, dank' al Antonio De Salvo).

* * *

Itala Junulara Festivalo 2017: Castione della Presolana (BG), 12-a-18-a de Aprilo

Alberto Vitale

Kiel kutime, dum la venonta semajno de Pasko, de la 12-a ĝis 18-a de Aprilo, okazos la IJF. Ĉi-jare, la Itala Esperantista Junularo atendas vin ĉe Castione della Presolana (BG) – enfote – en la belega norditala regiono Lombardio. La temo estos: "La paca revo inter la militaj tenebroj". Por partopreni, sufiĉas viziti la retejon http://iej.esperanto.it/ijf/ kie troveblas multaj informoj pri la evento. Pro tio ke 2017 estas la datreveno de la morto de Zamenhof, tre grava evento okazos dum IJF: vendrede, IEJ kune kun IEF aranĝos tagon entute dediĉita al Zamenhof, kun prelegoj, kaj lecionoj por memore soleni la komencanton de nia lingvo.

Aliĝi jam eblas, ni atendas vin ĉiujn! Por pliaj informoj: iej@esperanto.it, aŭ telefone: 366.2280160.

LITERATURA TRADUKKONKURSO

IEF decidis organizi literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto.

La konkurso konsistas el du branĉoj:

poezio: maksimuma longo ne fiksita

prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

La rezultoj estos anoncataj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, en Heraclea.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp).

La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso konkurso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas oni sendu ilin papere al la adreso Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Limdato por la sendado estas 30-an de aprilo 2017.

La sekretario informos ĝis la 15-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por pliaj informoj: konkurso@esperanto.it
FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano

CONCORSO MARELLI 2017

In attuazione delle disposizioni testamentarie del compianto esperantista Pier Luigi Marelli, è indetto anche per l'anno prossimo un concorso per la premiazione di giovani in possesso del diploma di esperanto di 3° grado.

La domanda va presentata in FEI entro il 30.04.2017.

Per informazioni: Federazione Esperantista Italiana – Via Villoresi 38, 20143 MILANO – tel. 0258100857 – feisegreteria@esperanto.it

Luisa Madella Oberrauch, nia itala ILEI-respondeculino.

Davide Astori

Luigia Oberrauch Madella naskiĝis en la regiono de Dolomitoj, antaŭ la dua mondmilito. Post la abiturienta diplomo (1955) ĉe la germanlingva pedagogia altlernejo de Merano ŝi ekinstruis en germanlingvaj kaj poste itallingvaj bazlernejoj de Bolzano kaj Mantovo. En 1971 ŝi translokiĝis al Parmo (Parma) kie ŝi instruadis ĝis 1995 en bazlernejoj en kiuj ŝi respondecis pri speciala lernej-eksperimento pri frua enkonduko de fremdlingva instruado. Kun Esperanto ŝi konatiĝis somere de 1987 en Grezijono (la kulturdomo de la francaj esperantistoj). Ekde 1995 ŝi studis la Cseh-metodon kaj dum la UK en Vilno trapasis la lastan ekzamenon, sekve ŝi estas diplomita Cseh-instruisto. Septembre de 1997 ŝi sukcesis en la instrurajtiga ekzameno de la "Itala Instituto de Esperanto". De kelkaj jaroj ŝi respondecas pri la itala sekcio de la "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj". Kunlaborante al EU-Projektoj "Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj" kaj "Interkultura kaj Multlingva Dialogo" ŝi vizitis, kun la gekolegoj de Modeno (Italio), Polski Trambesh (Bulgario), Glostro (Britio), Ejea de Los Caballeros (Saragozo), la Escola Secundaria Braancamp Freire-Pontinha de Lisbono (Portugalio) kaj la duagradan lernejon I.E.S. "Cuatro Caminos" de Don Benito (Hispanio). Jen eta intervjuo al ŝi.

Kial vi estas esperantisto? Al mi plaĉas instrui la ŝlosilon por eniri en la kernon de la internacia lingvo Esperanto. Laborante por tiu ĉi celo, mi sentas, ke mi faras ion konkretan por la paco kaj por pli homama mondo. Lerni la internacian lingvon iniciatitan de Zamenhof estas, laŭ mi, vojo al pli bona kompreno de la kulturoj de aliaj popoloj. Nia planedo ja riĉas je grandaj artaĵoj kaj memorindaj eltrovaĵoj kiujn ni ŝuldas al aliaj popoloj kaj al homoj de aliaj nacioj. Mi opinias, ke povi komuniki per internacia neŭtrala lingvo ebligas vidi en la aliulon antaŭ ĉio kaj precipe la homon.

Kiel vi taksas la estontecon de Esperanto? Se mi tralegas la rakontojn de la gesamideanoj de la pasinta jarcento, mi konstatas, ke eble mankis al ili la necesaj financaj rimedoj, sed tute ne mankis al ili la tempo kaj ankaŭ la forta volo studi ĝisfunde la lingvon. Hodiaŭ ne plu estas tiel. Bonŝance ne temas nur pri lingvo, sed ankaŭ pri komunumo en kies sino daŭre naskiĝadas esperanta kulturo. Tiu ĉi fakto estas tre grava precipe por la estonteco.

Demandu vin mem pri io (grava por esperantujo) kaj bonvolu doni respondon. Kion ni faru por konvinki la politikistojn pri la fakto, ke internacia neŭtrala lingvo estas necesa? La kampon de la politiko invadas aliaj interesoj: povo, persona riĉeco, karieremo, ŝovinismo k.t.p. Plurfoje membroj de la itala ĉambro de la deputitoj klopodis prezenti leĝproponon por la instruado, tamen neniam ili sukcesis. Sed ni ja scias, ke la politikistoj moviĝas nur se ili havas sufiĉe da konsento fare de la voĉdonantaro. Aliaj eblecoj aperas kaj ni ja devus ilin eluzi: la kursoj en la reto, la projektoj de lernu-net kaj edukado-net, k.a. Mi invitas miajn karajn gekolegojn nepre registri la kursojn de Esperanto en la kursejo de www.edukado.net.

Pedro Auguilar Solà, la optimisma finvenkisto

Carlotta Pavese

Pedro Aguilar Solà, konata kiel la plej sperta E-instruisto en Torino kaj Piemonte, naskiĝis en Venezuelo en la 40aj jaroj. Por la universitataj studoj, tre juna li translokiĝis al Madrid kaj poste al Torino, kie li komencis ankaŭ labori. Ĉi tie li estis prezidanto de la Junulara Sekcio de Torino E-Centro, kaj poste Sekretario kaj Vicprezidanto de TEC dum 30 jaroj. Dum pluraj jardekoj li laboris profesie kiel instruisto pri la hispana lingvo en prilingva liceo, teknika tradukisto kaj interpretisto. La pasintan jaron aperis la dua eldono de lia malibro por lernado de Esperanto en 15 lecionoj. Intervjuite, li respondis:

Kial vi estas esperantisto? Mia unua kontakto kun Esperanto estis vere stranga. Kiel infano, mi kantis kanzoneton, kiu diris, hispane, "Ni instruos al vi la anglan, kelkajn frazojn de Esperanto, kaj la saman kvanton de la franca". Do, mi sciis ke Esperanto estas lingvo, kiel la franca kaj la angla, sed neniam kaj nenie mi renkontis homojn kiuj parolas ĝin. Kiam mi alvenis al Torino, en 1960, tute hazarde mi konis knabinon kiu diris "mi lernas multajn lingvojn, ankaŭ Esperanton". "Diable! Esperanto!" mi respondis. Do mi iris kun ŝi kaj ĉeestis lecionon de Giuseppe Grattapaglia ĉe la Popola Universitato. Mi restis frapita de la lingvo kaj ĝisdatiĝis kaj, post brila ekzameno, oni sendis min al internacia junulara E-renkontiĝo okazonta en Romo, kie mi, kun dekoj da samaĝuloj, parolis lingvon kiun mi tute ne konis 4 monatojn pli frue.

Kiel vi taksas la estontecon de Esperanto? Mi fidas je ĝia sukceso, je la "fina venko", kiel oni diras. La nombro de la homoj, ĉefe de la gejunuloj, kiuj uzas Esperanton kreskas kaj iam venos inteligenta kaj longvida registaro kiu decidos eksperimenti la instruadon de Esperanto en kelkaj mezgradaj lernejoj, ekzemple. Oni tutcerte konstatos ke sufiĉas ununura lernojaro por ke la gelernantoj skribu kaj parolu ĝin plene kontentige.

Demandu vin mem pri io (grava por esperantujo) kaj bonvolu doni respondon. [Li ridas] Nu, la unua demando kiu venas al mia menso estas: kial multenombraj homoj kiuj aliĝas al niaj kursoj antaŭ ties fino rezignas pri la lernado kaj malaperas? Laŭ mi la solvo estas: la kursoj praktike vidigu, ekde la komenco, ke Esperanto estas vivanta, rapide lernebla lingvo. Male, ofte oni dediĉas la lecionojn al korektado de hejmaj taskoj de unuopaj kursanoj, kio enuigas la ceterajn. Al miaj kursanoj mi petas sendi retpoŝte la taskojn al asignita asistanto, kiu resendos ilin kun korektoj kaj komentoj. Tiel, post la prezento de la novaj gramatikaĵoj, la instruisto povas dediĉi la restintan tempon al praktika uzado de la lingvo, ĉefe al konversacio.

PREMIO "GIORGIO CANUTO" PER TESI DI LAUREA IN INTERLINGUISTICA ED ESPERANTOLOGIA

VIII edizione

Si indice per l'a.a. 2016-2017 l'ottava edizione del concorso per la migliore tesi di laurea (triennale e specialistica) discussa in una università italiana negli ultimi tre anni accademici: il premio è dedicato al Prof. Giorgio Canuto, già magnifico Rettore dell'Università degli Studi di Parma dal 1950 al 1956 e Presidente Internazionale del Movimento Esperantista dal 1956 al 1960.

